Registered at G.P.O., Melbourne, for transmission by post as a newspaper.




(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:
BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).
Abono (por 10 numeroj):
Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj——Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.
Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.
Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.
Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo—12 linioj: 3 ŝilingoj.
Ce ĉiuj poŝtmandatoj kaj -monbiletoj igu S-ron Roy Rawson la pagato.

N-ro 160 (14th Year). MELBOURNE (AŬSTRALIO). 14 APRILO, 1934.

## FORMORTINTA POPOLO.

La indiĝenoj, kiuj iam vivis en Tasmanio, laŭiris ŝtupojn de evoluo similajn al tiuj de la Aŭstraliaj, sed inter la du popoloj troviĝas forte malsamaj trajtoj. La Tasmaniaj estis uloj mizeraj, mallonganazaj, krispharaj. Ili kunvivis en grupoj malgrandaj, kaj tiel mallaboremis, ke, farante fajron, ili bruligadis nur du-tri lignopecojn, kaj por estingi aŭ kunigi la pecojn ili uzadis la piedfingrojn. Esploristoj, kiuj frutempe renkontis la indiĝenojn, trovis ilin malatakemaj, bonhumoraj—amikiĝemaj simpluloj, kiuj havis fortan amon eĉ al siaj skabiaj hundoj. Homoj kaj hundoj dormis kaj manĝis unu kun la alia; la mangaĵoj konsistis plejparte el kanguruoj, didelfoj kaj fiŝoj. La iloj uzitaj estis el ŝtono kaj tiel primitive faritaj, ke multajn oni konsiderus nur kiel kuriozajn ŝtonpecojn. En iuj regionoj (ekz. en la nordo) oni ankoraŭ iafoje trovas restaĵojn (ilojn, iamajn loĝlokojn kaj sim.) de la landidoj. Fakulo A. L. Meston, magistro, trovis proksime de Devonport signojn, kiujn li kredas esti desegnaĵoj fare de la indiĝenoj—tre grava eltrovaĵo, tial ĉar dum longa tempo oni opiniis, ke la desegnoarto apartenas al pli alta kulturnivelo ol tiu de la Tasmaniaj homoj.

~~Antaŭ ol elmortis la idoj de l'naturo~~ ilia lingvo diseriĝis en kvar reciproke nekompreneblajn dialektojn, sed oni trovas multon frape belan en tiuj idiomoj. Okcidente ekzistas loko, kie du riveroj renkontiĝe formas trian. Ĉi tiun lokon la indiĝenoj nomis "Tullah" (nun la nomo de urbeto), signife "Renkontejo de l'akvoj." Ĉu ne poezia?

Kiam la angloj eklogiĝis en Tasmanio, tiam nomata Lando de Van Diemen, ili uzis la insulon kiel malliberejon por krimuloj. Ĉi tiuj, forkurinte, ofte fariĝis banditoj. La indiĝenojn ili mortigis dekope, kun la rezulto, ke ĉi tiuj ekmalamis ĉiujn blankulojn kaj poste reciproke mortigis bedaŭrinde ne nur la banditojn sed ankaŭ honestulojn.

Tiel vasta fariĝis la interhoma buĉado, ke fine per helpo de George Robinson oni persvadis la indiĝenojn elmigri el Tasmanio en apudan insulon (Insulo de Flinders). Tie ili malfortiĝis kaj finfine elmortis; la lasta el la raso estis nomita Truganini—belulino eĉ laŭ kriterio de blankuloj.

Tiel finiĝis tre interesa popolo; sed interesatoj povas ankoraŭ renkonti ĝiajn duonblankajn idojn kaj vidi lokojn, kie ĝi pasloĝis, samsame praaspekte kiel vidis ilin la nigruloj, ĉar ĝis nun multaj regionoj en Tasmanio restas senhomaj kaj en sia primitive sovaĝa stato. (C. C. Cowling.)

### Scouting and Esperanto

At the Scout Jamboree to be held at Frankston, Victoria, during the Melbourne Centenary celebrations difficulties are likely to arise in regard to the language question. Few Australian Scouts speak anything but English, so, unless visiting representatives of foreign Scout organisations are able to use that language matters are likely to be at a deadlock. Recognising this, the Melbourne Esperanto Club, as soon as they heard of the Jamboree, approached the Organising Secretary, Major Harcourt. They proposed that local scouts be urged to take up the study of Esperanto and engaged themselves to teach, either direct or by correspondence, any applicants who should present themselves for tuition.

Following an announcement in the local scout paper a good response was received by Mr W. Brentwood, who is handling the affair for the Esperanto Club, and arrangements have been made to provide opportunities for learning the language.

Esperanto groups in countries from which scout visitors may be expected have been notified of Melbourne Club's action and asked to co-operate by pro-

viding facilities for intending visitors to learn the language.

## NOTHING EVER HAPPENS NOWADAYS.

**Emma Osmond.**

A few days later, in a small town in Carinthia, we noticed that a man was following us. Where we stopped, he stopped, and at last we decided to return to the hotel. A teacher had offered to show us round the neighbourhood, on Sunday morning, but as a heavy storm of thunder and hail came on, he proposed a visit to the Museum. To our surprise, the same young man followed us in; he had evidently been waiting outside the hotel. But this time he came up to our guide, and began speaking in Esperanto to him. On being introduced to him, we found out why he had been shadowing us. He had heard our Esperanto and seeing that we were foreigners, wished to talk to us, but was too shy, till he saw us with a member of his group. In the evening, we wandered into the principal hotel to hear the concert, where we saw an Esperanto flag on one table, and an English lady sitting near by, waiting to see if any Esperantists would appear, as she was travelling alone. I had read and used her Esperanto grammar-book, but I had never met her before. During the evening, about twenty local Esperantists appeared, some of whom made arrangements to meet us each day to show us the beauty spots of the neighbourhood.

On our way home from Austria, we again had the good fortune to meet a helpful Esperantist. We had always heard that Austria was a small country, so we imagined that a few hours would bring us to the frontier. We stayed till the last day allowed by our Esperanto-congress ticket. We were surprised to find that the mountainous nature of the country made the journey much longer than we had expected, and after our time-limit had expired we had to explain why we were travelling in a train with a ticket which did not entitle us to do so. The puzzled query of the inspector was explained to us by an Italian who understood German and Esperanto. He took our tickets and showed them to the inspector, asking, "Do you mean to say that you know nothing about the Esperanto Congress in Vienna, which 3400 people attended? I heard of it in Italy. Well, these wellborn ladies are travelling home from it." The astonished inspector did not know how to answer this attack, and disappeared. So after we had parted from our kind Italian, whenever anyone looked puzzled about our tickets, we looked as important as we could, and presented our Congress-tickets, saying with an air of decision, "Esperanto-Congress." By means of this talismanic pronouncement we succeeded in getting to the Swiss frontier without further trouble.

One more instance—In 1915, I was waiting on the platform at Narbonne station for a train to Barcelona, and feeling rather nervous about how we should pass the frontier, as neither of us knew any Spanish. Just then there was a strict police supervision. When the Paris train came in, we heard our names called, and to our pleasure found a Catalan friend with a German Esperantist on their way to Barcelona from the Paris Exhibition. At the frontier we had no difficulty at all, and although we stayed some time in Spain, as our friend guaranteed our harmlessness, we did not even have to register with the police. On the journey, our time passed pleasantly in learning the numbers and some Catalan phrases in everyday use, and in witnessing a vigorous discussion between the Catalan Esperantist and a fellow-traveller on the advantages of Esperanto. They became so energetic, in spite of the heat, that we were afraid that a quarrel was taking place, for we did not know till later the subject of the conversation.

Now about foreign Esperantists in England. One day when I was watching the changing of the guard at Buckingham Palace, I heard a lady asking in French what they were doing. I felt sure my French was not equal to explaining such a very English custom, but when I saw that the gentleman with her was wearing an Esperanto star, I introduced myself and we were soon in conversation. I had two hours to spare, and as the French visitors knew no English they gratefully accepted my offer to show them Whitehall and Westminster Abbey. They were delighted with Dean's Court and the Cloisters, and prepared to take a photograph, but I showed them a notice forbidding it. The man begged me to go away while he took some, for as he could not read or speak English, that would excuse him. We sat at a little distance, and watched the proceedings, and as no one appeared he got his photographs.

On another occasion, I had left an Esperanto service in a London church and was going with a Dutch lady to a restaurant where a room was open for Esperantists on Sundays. We saw a dark-complexioned man looking up and down the street, and as we approached, he noticed my Esperanto star, pointed to his, and explained that he was trying to find a restaurant. We invited him to tea and introduced him to other Esperantists. When I visited Barcelona, three years after, this Catalan was one of the first persons to greet me.

In Trafalgar Square and in Hyde Park I have also met Esperantists from other countries. My experience has shown me it is unwise to talk unguardedly in Esperanto, for many people understand it. I could give you many more instances of its usefulness, and can assure you that it is the only language which takes away the feeling of being a foreigner in a strange land. No other language opens the homes of people of all nations to you.

(The End)

## KORESPONDADO.

Vienano, 21-jara, volas novaĵojn el Aŭstralio, vidaĵkartojn, bildgazetojn. Jozef **Brunner**, 18 Paulineng. 9, 2, iv, 13. Vieno.

Germano korespondus letere, bildkarte. Respondo certega. R. Goebel, Rabenau b/Dresden.

**Hedwig Winkelmann**, Herford in Westfalen, Ludwig-Windhorstr., 35, Germ., tre volas interŝanĝi p. markojn.

## TO OUR SUPPORTERS

**Thanks for the following:** Mr. L. Illingworth, 9/-, December, 35; Brisbane Esp. Society. 12/-, (sales); Mr. W. Holloway, 4/6, Feb., 35; Miss E. Leftley, 4/6, Sept., 34; Mr. F. J. Hills, 4/6, Dec., 34; Mr. Holmes 2/6, Aug., 33; Mr. C. W. Ballard, 4/6, Dec., 34; Mr. Gray, 5/-, (foreign subscription); Coburg Esp Club, 2/6 (sales); Mr. J. Girdwood, 4/6, June, 35; Miss Berthold, 5/-, Dec., 34; Mrs Hanks, 4/6, Sept., 34; Miss Beswick, 4/6, Oct., 34; Rev. Lambton, 4/6.

# PARALLEL TRANSLATION.

**Amo kaj Literaturo.**

Estas tre dubinda tio, ke oni povas ĝuste nomi la plej famajn rakontojn de la mondo "amrakontoj". Ili ne estus famaj, se la viroj kaj virinoj en ili ne estus motivataj de tio, kio daŭre impulsas la vivon antaŭen; sed tiuj verkoj ne teme pritraktas la amon. Se ni nur mallonge pripensas la demandon, ni devas konfesi, ke la ambicio kaj la impulso al aventurado progresigis la homaron en multe pli alta grado ol faris tion la seksa impulso. Ĉu pro amo James Watt eltrovis la vapormaŝinon, ni ne scias. Li ne diris, ke jes. Ĝi ne estis virino, kiu pelis Kolumbon al lia serĉvojaĝo al Ameriko. La ideo pri la aeroplano ne ekestiĝis en litĉambra sceno. Pense pezu la kvanton de pro-ama intereso en La Progreso de la Pilgrimanto, Robinson Kruso, Don Kihoto, La Vojaĝoj de Gulliver, Gargantua kaj Pantagruel, Makbeto, Reĝo Lear, kaj Hamleto, Tristram Shandy, Moby Dick, La Insulo de la Pingvenoj, La Pickwick'a Kroniko, jam ne parolante pri Vojaĝa Fino, kaj En Okcidenta Nenio Nova.

Esperantistoj firme kredas, ke d-ro Zamenhof, dum ke li ellaboris Esperanton, estis puŝata de emociaj pelfortoj, kiujn la plejparto de l'homoj opinias esti tute malsamaj ol la pure seksa motoro. Kiam li elektis tiun majstran romanon, Marta de Orzeszko, li donis al ni ne nur Esperantan tradukon de unu el la plej bonaj pecoj de la Pola literaturo, sed ankaŭ verkon en kiu la amoj de viroj kaj virinoj---amoj cetere ne tre gravaj---nure helpas formi fonon por la centra figuro de la sorte-turmentata vidvino

**Love and Literature**

"It is very doubtful indeed whether the great stories of the world are "love stories". They would not be great if men and women were not moved in them by what keeps life going on, but love is not their theme. If you consider it for a moment, you must admit that ambition and the urge to adventure have done more for the world than the attraction in sex. Whether James Watt discovered the steam engine through love,we don't know, but he did not say so. It was'nt a woman who drove Columbus to the discovery of America. The idea of the aeroplane did not have its origin in a bedroom scene. Estimate the amount of love interest in "The Pilgrim's Progress," "Robinson Crusoe," "Don Quixote," "Gargantua and Pantagruel," Macbeth, Lear and Hamlet, "Gulliver's Travels," "Tristram Shandy," "Moby Dick," "Penguin Island," "Pickwick Papers," to say nothing of "Journey's End," and All Quiet on the Western Front."

Esperantists firmly believe that Dr. Zamenhof, in ellaborating Esperanto, was moved by emotional impulses generally held to be far removed from the purely sexual motive force. By his choosing that masterly novel Orzeszko's "Marta," he gave us not only an Esperanto translation of one of the finest pieces of Polish literature, but also a work in which the loves of men and women, such loves as they are, merely help to form a background to the central figure of the fate-harried widow.

---

vis bonan rimedon por servi kun tuta animo du mastrojn samtempe. Jam poveblas senhezite sekvi Kriston sur la Ĉiela Vojo, kaj postkuri la flatglorajn terflorojn, bagatelojn, tronojn kaj kronojn de la nuna mondo. Kial la nova ĉefepiskopo ne diris, sed senhipokrite: "Ni ja predikas Jesuon Kriston; jen belsona oportuna religia frazo. Tamen ni praktiku nian imperiisman vojon, ĉar ni naskiĝis britoj por esti filoj de Britujo, kia mi; tute ne por esti filoj de Dio, kia Kristo. Ho jes, ni **prediku** Jesuon Kriston, sed ni **praktiku** britan imperiismon?"

Ĉu ne similas certajn scenojn de la Progreso de la Pilgrimanto ĉi tiu bildo de progresvola homaro funde perdita en la fi-arbaro Naciismo, kiun regas gigantoj vere hommanĝaj?

Willoughby, NSK. —J.E.

Aperos: "Feliĉeco," J. Gray.

Next number 21st May.

What do you think of La S.K.?

Ne forgesu provizi la benzinon!

**Melbourne Esperanto Club.**—Wednesdays, 8 p.m., Australian Church Hall, Russell-st., Melb. Mr. R. Rawson, 169 Exhibition-st.

**Melbourne Esperanto Society.**—Tuesdays, 8 p.m., Scots Church Hall, 97 Russell-st., Melb. Secretary, Miss L. Irwin, Box 731F, P.O., Elizabeth-st., Melb.

**Coburg Esperanto Club.**—Thursdays, 8 p.m., Labor Hall, Sheffield-st., Coburg. Secretary, Mr. A. Spencer, 48 Munro-st., Coburg.

**Sydney Esperanto Society.**—Thursdays, 8 p.m., 2nd Floor, Manning Bldg., 449 Pitt-st., Sydney. Secretary, Mr. L. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbane Esperanto Society.**—2nd and 4th Tuesdays in each month. State Service Union Room, 59a Elizabeth-st. Secretary and president, Mr. L. Parry.

**Adelaide Esperanto Club.**—Thursdays, 7.45 p.m., Paringa Bldg., Hindley-st., Adelaide. Secretary, Mr. F. Droop, 13 Chatsworth-grove, Toorak Gardens.

**Westralian Esperanto Society (Perth).**—Meets every week. Secretary, Mr. D. Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth.

**New Zealand.**

**Wellington Esperanto Club.**—Tuesdays, 8 p.m., Y.M.C.A., Willis-st., Wellington. Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn.

**Masterton Esperanto Club.**—Tuesdays, 8 p.m., Y.M.C.A. Secretary, Mr. H. Franks, D.B.E.A., 38 Worksop-rd., Masterton.

**Auckland Esperanto Society.**—Mondays, 7.30 p.m., New Church Hall, Newton-rd. Communications president, Mr. J. Russell, 2 Pukenui-rd., Epsom.

**New Zealand Esperanto Association.**—Headquarters of the international language movement in New Zealand. Patrons: Sir George Fowlds, C.B.E., Auckland, and Prof. J. Macmillan Brown, Christchurch, Chancellor of the New Zealand University. President, Mr. W. L. Edmanson; Vice-pres., Mr. C. Brandon, Auckland, Mr. H. E. Facer, Palmerston North, Mr. A. Dewar, Masterton, and Mr. L. A. Efford, Christchurch. Hon. Treas., Mr. E. C. Jack, Wellington; Hon. Secretary, Mr. Wm. H. King (Room 106, G.P.O. Bldgs., Wellington, C.1.). Operations: Propagating Esperanto; arranging annual congresses; conduct of correspondence courses; supplying information, etc.

Wholly set up and printed in Australia by the Triumph Press, Surrey Hills, Victoria.